Laŭzana Esperanto-Societo
Decembro 2019 - n-ro 10

# Laŭzana informilo

## Venontaj kunsidoj:

- Lu, la 6-an de januaro *Knud prelegos*
- Lu, la 3-an de februaro *Asembleo*
- Lu, la 2-an de marto *Decidota*
- Lu, la 6-an de aprilo *Decidota*

## Sabate, la 14-an de decembro, je 11h30

## Ni festos la memoron de L.-L. Zamenhof

## *Fonduo en Auberge Communale d'Epalinges*

Karaj Geamikoj,

Ni ĵus ricevis leteron de la redaktoro de la gazeto IRO Magazine, S-ro Narcisse Niclass, respondeculo de la « *Revue de l'invention et de l'innovation en Romandie* ».

Li skribas al ni ke li aŭdis pri la filmoj realigitaj de la Laŭzana Societo kaj proponas al ni projekcii ilin dum 5 tagoj en la **Inventista Salono en Ĝenevo kiu okazos en Palexpo inter merkrede, la 25-a ĝis dimanĉe, la 29-a de marto 2020.**

Sinjoro Niclass povus akiri por ni privilegian surfacon « en la Verda Insulo » de la ekspozicio kun 20% rabato. Li garantias la ĉeeston de Gabriel Marchon, kiel teknikisto tuttempe.

La proponita aero estus je 2x3 m., t.e. 6m$^2$ je 280.- la kvadrata metro. Bezonus pagi la sumon de sFr 1200.- por la stando kiu permesus nin malfermi la dialogon pri esperanto kun la publiko venanta el la tuta mondo. Ni povus projekcii niaj filmoj, subtekstitaj:

**TETASO AMAS VOJAĜI**

**LA MAGIA LANDO**

**LA SEKRETA VILAĜETO**

Diru al ni kion vi pensas pri tiu propono. Ni diskutos pri ĝi dum la Zamenhofa Festo.

PS: Ni proponos al la Ĝenevanoj partopreni.


**Laŭzana Esperanto-Societo**

pa. F. Randin

ch. de la Vallombreuse 14

CH - 1004 Lausanne

sekretario@eo-l.ch

+41 21 647 29 28

facebook.com/esperantolausanne

youtube.com/esperantolausanne

dailymotion.com/esperantolausanne

poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8


**Komitato 2019**

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

# La komitato informas:

Vendrede, la 6-an de decembro je la 19-a

**Babilada Rondo**

ĉe Knud kaj Marie-Antoinette
Av. des Alpes 150 à Montreux.

*Karaj GeAmikoj,*

*Bonvolu aliĝi kaj diri telefone al 021 961 38 56 aŭ 079 210 97 75 se vi venos aŭ ne. Post la kutima babilado, ni vespermanĝos kune. Marie-Antoinette kuiros (kun kaj sen ŝinko).gratenaĵon de terpomoj Alportu trinkaĵojn, aperitivaĵojn, kaj deserto(j)n (ne tro).*

*Notu ke en Montreux nun okazas la kristnaska bazaro, do venu trajne.*

*Ne facilas parki veturilon. Venu grupe kaj ni ofertos nian parklokon. Alvoku nin alvenonte.*

*Amike al ĉiuj. Knud kaj M.-A.*

Kiel kutime,
**Sa, la 14-an de decembro**
okazos
nia *Zamenhofa Festo*
en l'*Auberge d'Epalinges*;
ni kune fonduumos.



**Bonvolu pagi al nia konto CCP 10-26785-8, sFr 25.- por tiel aligi vin ĝis la 8-a de decembro.**

Trovu indikajn vortojn en skemo. Restantaj literoj formas nomon de bildo.

| | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| B | O | G | O | T | O | O | V | K | S | O | M |
| P | O | R | T | O | N | O | V | O | N | N | E |
| O | I | K | O | T | A | V | O | O | K | O | K |
| V | H | E | L | T | M | G | T | A | T | D | S |
| E | O | R | U | P | A | G | N | I | S | N | I |
| J | A | E | D | I | N | B | U | R | G | O | K |
| A | R | S | T | I | E | Q | N | I | N | L | U |
| R | K | N | Ŝ | R | K | O | T | A | B | A | R |
| A | A | A | O | N | A | P | O | M | L | E | B |
| S | V | O | K | A | T | M | A | N | D | U | O |

AKRAO
AMANO
BELMOPANO
BOGOTO
EDINBURGO
KANBERO
KATMANDUO
LONDONO
MEKSIKURBO
MOSKVO
OTAVO
PORTONOVO
QUITO
RABATO
SANTIAGO
SARAJEVO
SINGAPORO
TOKIO
ULANBATORO
VAŜINGTONO



# Karlo de Edmond Privat

## deka ĉapitro: *Liceano*

Karlo sukcesis la ekzamenon kaj estis akceptita kiel lernanto ĉe la liceo. Matene la lecionoj komenciĝis je la 8-a kaj daŭris ĝis la dekdua, kun dek minutoj da intertempo ĉiuhore inter la lecionoj. Tagmeze Karlo devis rapidi hejmen por ne alveni malfrue por la tagmanĝo. Post la deserto li tuj devis reiri, ĉar jam je la unua kaj duono komenciĝis posttagmeze la lecionoj.

Post kelkaj semajnoj da lernado en la liceo, Karlo jam sciis multe: Li ne kisis plu sian fratinon. Li ne plu marŝis sur la trotuaroj, sed flanke de ili, ĉefe se restis pluvakvo. Li tenis siajn manojn en la poŝoj kaj eltiris ilin kelkafoje por doni pugnobatojn facile kaj rapide. Li sciis vortojn, kiujn lia fratino ne komprenas. Li havis ofte truojn je siaj ŝtrumpoj kaj ankaŭ kelkafoje je sia pantalono. Li diris ofte: "Mia amiko Janko vidis tion", aŭ "mia amiko Delesar diris tion ĉi", aŭ "mia amiko Vuanzo faras nur mallertaĵojn". Li havis la manojn tute nigraj en la fino de la tago. Li ofte estis desegninta vizaĝetojn sur siaj ungoj. Li sciis paroli pri politiko; li diris "tiu malsprita ministro", aŭ "danĝera hundo, tiu deputito!"


Karlo nun havis ĉe la liceo multajn amikojn, aŭ pli bone multajn kamaradojn, ĉar li ne estimis ĉiujn egale. Estis Belnett, kiu multe parolis, kaj Pietro, kiu lin ĉiam aŭskultis. Estis Rigar, tre dika, kiun oni nomis "kukurbo"; ĉe la banejo, li ne bezonis naĝi: tute senmove li restadis sur la akvo, kiel peco da ligno. Estis Paŭlo kaj Davido Rois, du fratoj, kiuj ĉiam tre bone laboris kaj dum la lecionoj neniam parolis aŭ bruis.

Estis "Kokido", la malgrasa knabeto, ĉiam tre zorge vestita kaj ĝentila, sed ĉiam pala kaj timema; Rigar diris pri li: "Mi ne volus lin tuŝi, ĉar mi timus lin disrompi." Estis Kahn, filo de riĉa bankisto. Estis Donel, kiu ĉiam aĉetis bombonojn kaj sukeraĵojn. Estis Laminde, kiu tre bone deklamis; Servetti, kiu admirinde imitis ĉiujn bestoblekojn; Cenar, tre malavara; Holder, ĉiam pensema kaj silenta; Vuanzo, ĉiam ridanta; Robert, fiera kaj kolerema; Peter, filo de panisto, ĉiam kun ruĝa kravato; Man, kiu fabrikis fajfilojn.

Estis Pergo, kiu ĉiam iris paroli kun la profesoroj post la lecionoj. Estis Delasar, kiu pretendis esti kuzo de l' Prezidanto de la Franca Respubliko. Estis Tomaso, kun grandaj flikaĵoj ĉe la genuo sur sia pantalono, kaj Gardiol, kiu tre bele ludis violonon kaj ricevis premion ĉe la muzika lernejo. Estis ankaŭ Stanen, ĉiam malbonodoranta; Belti kaj Travis, kiuj ambaŭ loĝis ekster la urbo. Estis Roĝers, kies patro havis aŭtomobilon. Allen estis irlandano kaj Zerapumis estis greko. Estis ankoraŭ kelkaj aliaj plue.

Sed *la* amiko de Karlo, la vera, la fidela, la plej bona, la plej lerta, estis Janko, kiu estis . . . Janko.

# Intervjuo de Maryse Tissot, Prezidanto de nia societo



(Fare de Francisko)

*- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

**Mi naskiĝis en 1971 en Ĝenevo. Poste mi venis en EPFL por studi "ekologion" (tiuepoke oni franclingve diras: le Génie Rural).**

*- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

**Mi, de ĉiam, interesiĝas pri la lingvoj. Iam, mi eniris serĉi inter-reten, malkovris la lingvon "esperanto" kaj informiĝis pri ĝi.**

*- Kiam vi decidis studi esperanton?*

**En 2015, mi aŭdis pri trajna vojaĝo por esperantistoj tra Siberio ĝis Vladivostoko. Mi aliĝis kaj do decidís pli bonigi mian konon de la lingvo.**

*. Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

**Mi neniam aŭdis negativajn reagojn, male la personoj estas scivolemaj. Nur laboreje, miaj kolegoj diras: *"Kial uzi esperanton, ĉu la angla ne suficas?"***

*- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

**Neniu ĉirkaŭ mi, studis esperanton. Ili nur informiĝis pri mia evoluo enlingve.**

*- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

**Fine de la trajna vojaĝo Siberia, ni partoprenis la kongreson en Seulo – Koreio (2017). Estis mia unua sperto … ege interesa. Dum tiuj tri semajnoj tra Rusio, mi konatiĝis amikojn kiujn mi vizitas ankoraŭ nun en Belgio.**